

Demandoj pri la Biblio

Demandanto: 26-a de Februaro 2006 Günter Sack

Prilaborado: 27-a de Februaro 2006 Norberto Sudlando

1. Demando

Ĉu la homofero de Jiftaĥ (Juĝistoj 11.31+34-40) ne per la leĝo de Moseo (Levidoj 27.28-29) estis ordonita?

2. Respondo

2.1. Konfirmo de la demando el la literaturo

En diversaj eldonoj de la Biblio Levidoj 27.29 ([1841Luth], [1974Luth]?) aŭ Nombroj 30.3{2} ([1910Luth], [1960Luth], [1972Sco], [1974Luth], [1982GN], [1985Luth], [1986Elb]) estas menciata kiel paralelocito por Juĝistoj 11.35, kie estas reguligata, ke la solena promeso ne estas revokebla. Ankaŭ ekzistas eldonoj de la Biblio (ekzemple [1841Luth]), kioj kiel paralelocito por Levidoj 27.29 montras al Juĝistoj 11.31+39.

Entute superregas daŭre granda neklarigo en la teologio pri la homofero de Jiftaĥ. Ĉi tia demando konsekvence ankaŭ el veraj motivoj estas demandata.

2.2. Diferenco inter sanktigateco kaj anatemo

Unue ekzistas diferenco inter *sanktigateco* kaj *anatemo*, ĉar la sanktigito estu oferdonata sur la altaro, la anatemitito estu mortigata sen altaro. Intermiksaĵo de ĉi tiaj nocioj ne estas celtaŭga. Levidoj 27.29 diras pri la anatemo kaj tial ne estu aplikata al la solena promeso de Jiftaĥ, kiu volis sanktigi puran beston kiel ofero.

2.3. Elaĉeto de sanktigataj homoj

Levidoj 27.26 diras pri tio, ke la unuenaskito inter la brutaro ne estas sanktigatebla, ĉar ĝi jam bezonas al la Eternulo. Nombroj 18.15 plue montras, ke la unuenaskito de homoj kaj malpuraj bestoj *ĉiam* estu elaĉetenda. Tio substrekas la eldiron de Jeremia 7.31, kie estas testata, ke Dio *neniam* deziris homoferon.

Kaj nun renkontas al Jiftaĥ lia unua, do unuenaskita filino. Li ŝin pro duobla kaŭzo devus elaĉeti – same ol unuenaskita ĉevalo. La jura situacio de la Biblio diras klare, ke ne homa vorto de solena promeso valoras pli alte ol la Dia vorto de la leĝo (la Agoj 5.29).

Jiftaĥ por la plenumado de sia solena promeso devus iri al la pastro en Ŝilon, pro tie delegi sian filinon por la temploservado, aŭ por elaĉeti ŝin respektive.

2.4. Kial Dio toleris tion?

En la tempo de Jiftaĥ regis la pastro Eli kun siaj ambaŭ filoj la sanktejon. Tio sekvas el la sekvantaj tempodatenoj (deklaro kun la plejebla maljuna | la plejebla juna dato por la respektiva momento):

efikokomenco de Eli:	15. 7.1139 antaŭ Kristo		23. 3.1112 antaŭ Kristo
efikokomenco de Jiftaĥ:	15. 7.1121 antaŭ Kristo		24.11.1110 antaŭ Kristo
efikofino de Eli:	15. 7.1098 antaŭ Kristo		23. 3.1073 antaŭ Kristo

Pri la juĝadotempo de Eli estas dirata, ke speciale liaj ambaŭ filoj kuŝis kun la virinoj, kiuj servis ĉe la pordo de la sanktejo (1-a Samuel 2.22). Tio do estus okazi ankaŭ kun la filino de Jiftaĥ, se Jiftaĥ konus la leĝon de la Eternulo pli bone.

Eli devus eksekuti siajn ambaŭ filojn al la gloro de Dio, sed nun Jiftaĥ faris al la gloro de Dio homoferon, kio montras la tiama senleĝecon de Izrael.

La demando pri la kialo de Dio en ĉi tia kazo nepre estas respondebla tiel, ke Dio volis, ke la filino de Jiftaĥ mortu kiel virino. La filinoj de Izrael eble ne plorus pri ŝia virgeco, se ŝi fariĝus per la ambaŭ pastrofiloj kiel putino – ankaŭ en tia kazo ĉi tia ploro estus adekvata.

2.5. Traktado kun mokistoj

La respondeco por la senleĝeco de Izrael tute trafas Elion. Lia peko laŭ 1-a Samuel 3.14 ne estas pardonebla, kio memorigas la konanton de la Biblio prompte al la eldiro de Jesuo Kristo pri la *moko kontraŭ la Sankta Spirito* (Sankta Mateo 12.31).

En 1-a Johano 5.16 kaj Hebreoj 6.4-6 ĉi tia temo ree estas prezentata. Laŭ tio ekzistas peko, kio tiel klare gvidas en la malvolo de la pentofaro, ke nek pekokonfeso, nek pekopardono okazas. Eĉ 1-a Johano 1.7-9 konfirmas ĉi tian situacion por la kazo, ke homo (ekster Jesuo Kristo) sin kvalifikas kiel senpekulo. Per tio ankaŭ ĉe Eli, malgraŭ klara katastrofavizo, neniam okazis pentofaro.

Hodiaŭ ankaŭ ree ĉe la konantoj de la Biblio ekzistas mokistoj, kiu egaligas la nociojn *sanktigateco* kaj *anatemo* (komparu ankaŭ Jesaja 5.20). La teologia literaturo kelkfoje por ĉi tia perturbo estas la ekigajo. La homoj, kiuj malŝatas la „vampiraj“ historioj de la Biblio, sufiĉe ofte estas profanaj mokistoj en pia vestaĵo. La montrata literaturo dokumentas, ke interne de la teologio ankaŭ antaŭ Nietzsche ekzistis malrespektaj mokistoj kontraŭ la vorto de Dio.

La sekura vojo en la ĉielan reĝon nepre ne estas bona pozicio en respektata eklezio, sed la kompatemo (komparu Sankta Mateo 5.7).

2.6. Ekstrakto

Ne ĉiam estas videbla, ĉu demando okazas serioze aŭ per moko. Por ambaŭ eblecoj ekzistas ĝusta respondo. La respondon al da mokantoj donis Jesuo Kristo, la Sinjoro, sufiĉe ofte mem: “Vi hipokrituloj, kial vi provas min?”

Pro tio, ke predikanto de la evangelio ankaŭ devas scii, kiel silentigi la malrespektajn mokistojn (komparu Sentencoj 26.4+5), la demando, ĉi tie traktata, kaj ĝia respondo, kio celas al la vera serĉanto, tute estas taŭga kiel ekzercotasko por la teologia instruado.

Ekzistas hipokritaj demandoj, kioj cele konfuzas la demandaton. La respondo por ĉi tiaj demandoj restas ĉe la demandanto. Ĉe la ĉi tie traktata demando la demandato komence ne supozis, ke la demandanto ne komprenis la malican egaligon de *sanktigateco* kaj *anatemo*. Dio mem kaj ankaŭ sia vorto estas sankta, pro tio ne taŭgas postbabili ĉian kritikon pri ĝi senpense.

La profeto Ĥabakuk finigas sian demandorondon al Dio kun la vortoj (Ĥabakuk 3{2}.20): „*Sed la Eternulo estas en Sia sankta templo; la tuta tero silentu antaŭ Li!*“, antaŭ ol li kantas sian laŭdokanton (Ĥabakuk 4{3} en la origena ĉapitronombro, elzemple ĉe [1841Luth]).

3. Literaturo

[1841Luth]

Die Bibel, oder die ganze Heilige Schrift Alten und Neuen Testaments nach der deutschen Uebersetzung Dr. Martin Luthers., revizio per D-ro J. Ph. Fresenius, (1751); presado kaj eldono per Heinrich Ludwig Bröner, Frankfurt am Main, 40-a eldono, (1841)

[1910Luth]

Die Bibel oder die ganze Heilige Schrift des Alten und Neuen Testaments, nach der deutschen Übersetzung D. Martin Luthers., reviziita eldono kun la teksto permesata per la germana evangelia eklezikonferenco, Brita kaj alilanda Biblia societo Berlin, (1910)

[1960Luth]

Die Heilige Schrift nach der deutschen Übersetzung D. Martin Luthers, nove reviziita (1914) laŭ la teksto permesata per la germana evangelia eklezikomisiono, Brita kaj alilanda Biblia societo Wien, (1960)

[1972Sco]

La nova Scofield Biblio kun klarigoj, Good News Publishers (Westchester, Illinois, U.S.A.) kaj Swiss Press "Grosse Freude" (Zürich), (1972)

[1974Luth]

Lutherbibel erklärt, Die Heilige Schrift in der Übersetzung Martin Luthers mit Erklärungen für die bibellesende Gemeinde, Biblia instituto Stuttgart, (1974)

[1982GN]

Die Bibel in heutigem Deutsch, Die Gute Nachricht des Alten und Neuen Testaments, germana Biblia societo, (1982)

[1985Luth]

Die Bibel nach der Übersetzung Martin Luthers, reviziita 1984, germana Biblia societo Stuttgart, (1985)

[1986Elb]

Die Heilige Schrift, Aus dem Grundtext übersetzt, Revidierte Elberfelder Übersetzung, R. Brockhaus Verlag Wuppertal, 2-a eldono, (1986)